


82-a Hispana Kongreso de Esperanto
la 5 - 8 de septembro 2024, Ĉeste, Valencio
KUNLABORADO, INFORMADO, RILATOJ kaj INSTRUADO
82a Hispana Esperanto-Kongreso
Valencio ★ Ĉeste ★ 5-8-an de septembro de 2024



Es un inmenso placer poder acoger en Cheste el 82º Congreso Nacional de Esperanto. Agradecer el trabajo de tantas personas que con intensa ilusión han organizado y participan de este Congreso.

Nos sentimos especialmente agradecidos por la elección de nuestro municipio. Cheste no se puede entender como sociedad sin la influencia que el Esperanto ha tenido a lo largo de nuestra historia.

Cheste se siente unido al Esperanto desde sus orígenes. Hemos aportado a ilustres personas que han hecho extenderse el Esperanto. Quiero hacer una mención especial al Grupo Esperantista LUM-RADIO de Cheste, por su constante labor para extender el Esperanto en estos días de nuevas tecnologías, que acaparan la comunicación.

Cheste siempre estará abierto a engrandecer el Esperanto. No es sólo una lengua, es una concepción del comportamiento, una visión del mundo que debe ser asumido y apoyado.

Cheste lleva en su corazón al Esperanto. Os deseo un fructífero Congreso y que os sintáis en nuestro pueblo como en vuestra casa.

Nome de la Chesteanoj, kiuj tiom ŝuldas al Esperanto, vi estas ĉiam bonvenaj.

**Jose Morell Roser**
**Alcalde de Cheste**
**Urbestro de Ĉeste**



Estimataj Kongresanoj de la 82-a Hispana Kongreso de Esperanto,

Kiel profesoro pri la hispana lingvo, kulturo kaj literaturo, kaj samtempe prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, estas ĉiam plezuro por mi ĉeesti la Hispanan Kongreson.

Mia edzino kaj mi aparte ĝuis la pasintjaran en Sevilo, kun la aldonita seminario. Mi havas belajn memorojn pri la Universala Kongreso de UEA en Valencio en 1993, kie mi reĝisoris la Kongresan Temon: "Edukado por la 21-a jarcento". Multe progresis la edukado de tiam, kaj dum ĉi tiu Kongreso mi intencas esplori kun vi la evoluojn en la instruado de lingvoj kaj aparte pri Interkultura Kompetento, kiu ne estis aparte videbla en la UK de 1993, je la konsterno de ekstera vizitanto.

Hodiaŭ, ni estas pli preparitaj por progresigi la Esperanto-movadon, ĉar ni povos per interalie teknikaj evoluoj oferti multe pli al la mondo por kontentigi ĝiajn bezonojn, kaj ne nur la niajn. Vi havos la okazon konatiĝi kun la strategia laborplanado de UEA, kaj interagi pri la nuntempaj bezonoj en la kvar kolonoj de nia planado: Kunlaborado, Informado (kun komunikado), Rilatoj (kun la ekstera mondo), kaj Instruado (kerna agado por ke nia lingvo estu ĉiam pli lernata kaj uzata por monda interkompreniĝo).

Konklude mi deziras al ĉiuj fruktodonan Kongreson en kiu ni povos kune ĝui ĉion kion alportas al ni la personaj kontaktoj kaj kleriĝo kiun faciligas nia lingvo. Mi aŭskultos kion vi bezonas kiel Landa Asocio de UEA, kaj ni esperu povi kune antaŭenigi la uzadon de Esperanto por krei pli kompreneman, pli pacan, kaj pli bonan mondon.

**Duncan Charters**
**Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio**

Prezidanto de UEA ekde 2019, magistriĝis en la brita Universitato de Cambridge kaj doktoriĝis pri la hispana lingvo kaj literaturo en la usona Universitato de Indiana. Dum sia kariero li instruis la hispanan lingvon, kulturon kaj literaturon aldone al gvidado de programoj pri instrumetodoj kaj preparo de lingvoinstruistoj en pluraj universitatoj, inkluzive tiun kiun li plej longe servis, Principia College.

Li estas pionira universitata instruisto de Esperanto en Usono, kaj ofte instruis en la NASK-programo inter ĝia komenciĝo en 1969 kaj 2023. Li instruis ankaŭ en centroj de Esperanto en Eŭropo, kaj lastatempe reprezentis al UEA en

unuafojaj vizitoj al Ĉinio kaj al Afriko por la Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio. Antaŭ lia nuna respondeco kiel prezidanto de UEA, li servis en simila pozicio al Esperanto-USA kaj al ILEI. Li estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 2016.



Estas por mi granda plezuro saluti nome de HEF en la mondfama urbeto Ĉesto, kie okazas la 82-a Hispana Kongreso de Esperanto, ĉar mi scias ke la LKK multe laboris kaj daŭre laboras por ke la evento iĝos neforgesebla kaj tio ĝoigas min, ĉar ĉi-jare mi adiaŭos kiel prezidanto post kvar jaroj de agrabla tasko kaj mi scias kaj deziras ke mia posteulo ĝuos ĝin tiom kiom mi, kvankam mi ankoraŭ estas redaktoro de Boletín kaj komitatano de UEA, do mi ne havas tempon por enuiĝo, ĉar por mi tio estas granda plezuro.

De kiam mi sciis pri la ideo kongresi en Ĉesto, mi tre ĝuis, ĉar multaj homoj el la tuta mondo konas tiun belan lokon pro la motorcikloj, sed la plimulto ne scias pri la unikeco de ĉi tiu urbo kie loĝas nombraj esperantistoj kaj havas tri stratojn kun nomoj de elstaraj homoj, interalie. Estos tre agrabla sperto promeni tra ĝiaj stratoj.

Ŝajnas ke la kongresejo estas bela kaj impona, laŭ la bildoj, kiujn mi vidis pere de la reto, tial sukceso estas garantiita, se ni plenigas ĝin.

Kaj se ni partoprenas la nombrajn ekskusojn, almenaŭ unu, du, la festo estos kompletigita, ĉar valoras la penon spekti novajn pejzaĝojn de la fama Valencio, kie manĝi rizon estas luksa bongustaĵo.

Mi deziras ĉion bonan al ĉiuj volontuloj, kiuj sindone preparis la eventon kaj kontaktis kun elstaraj esperantistoj por oferti kvalitajn prelegojn, ĉar la evento ne nur estas paradiza loko, ĝi estas unika. Koran gratulon.

Antaŭen! mi atendas vin.

**Ángel Arquillos**
**Prezidanto de HEF**

## MIAJ UNUAJ PAŜOJ

La Cuesta de Moyano estas la populara nomo de strato Claudio de Moyano en Madrido, fama pro la libroservoj aŭ budoj kun libroj (multaj el ili malnovaj kaj prez-rabatitaj), kiuj estas instalitaj apud la krado de la Botanika Ĝardeno ĉe la Paseo del Prado, kiu komunikiĝas kun la Parko Retiro kaj nuntempe estas piedira. Ĝi nomiĝas tiel laŭ la zamorana politikisto Claudio Moyano, aŭtoro de la Leĝo pri Publika Instruado de 1855 kaj kiu havas bronzan statuon ĉe la komenco de la strato.

Kial mi parolas pri tiu madrida ejo? Simple, ĉar tie mi malkovris la internacian lingvon. Tio okazis en la jaro 1979, kiam mi foliumis librojn kaj hazarde trovis volumon titolita Fabeloj de Anderson. Mi tralegis kelkajn paragrafojn kaj komprenis preskaŭ ĉion, do mi min demandis, tio ne estas itala, nek portugala nek kataluna, tiu lingvo devas esti Esperanto, la lingvo internacia, kompreneble.

Mi tutcertis, kaj post kelke da tempo, ankaŭ ĉe la Cuesta Moyano, en la komenco de la strato mi vidis ulon, kiu sidis ĉe malgranda tableto kun pluraj broŝuroj kaj flug-folioj pri reklamoj de Esperanto. Nekredeble, li povas helpi min kaj mi tuj lin demandis pri la ebleco lerni la internacian lingvon, kaj Juan Carlos, ĉar li nomiĝis tiel, volonte indikis al mi la straton Atocha, kiu troviĝas tre proksime, tie estis la Liceo de Esperanto kaj tie mi lernis danke al la tre konata de ni ĉiuj, Aŭgusto Casquero, ĉar li tiutempe ankaŭ loĝis en Madrido. Sufiĉis tri monatoj por akiri la necesajn konojn kaj babili pli malpli flue.

Okaze de Hispana Kongreso en la urbo Madrido mi profitis la eventon por ekzameniĝi, sed ne nur pri baza kurso, ĉar la ekzameno ŝajnis al mi tre simpla kaj ege facila, pro tio mi kuraĝis ekzameniĝi kaj akiri la atestilon de Esperanta Instruisto, kiu ne estis tiom facila, sed sufiĉe por trapasi ĝin kaj ricevi diplomon.

Kompreneble mi senhezite komencis instrui en la Madrida Liceo. Tio multe helpis min, ĉar por gvidi la klasojn mi estis devigata studi la lecionon por instrui kaj klarigi dubojn al la gelernantoj, kiuj estis grupo da universitatanoj. Mi devas konfesi ke tiaj lernantoj estas la plej bonaj kaj plej ŝatataj de mi, ĉar ili rapide komprenas kaj iliaj demandoj pri duboj ĉiam rilatas al la baza kurso. Mi ĉiam timis la tipan scivolulon, kiu demandas pri ĉio kaj komplikigas kaj la instruadon kaj la lernadon, ĉar demandoj nekonvenaj perdigas tempon kaj konfuzas ĉiujn, ĉar ne kongruas kun la nivelo kaj estas embaraso por bone sekvi la instruadon.

Do, post ĉi tiu kurioza sperto ĝis la hodiaŭa tago, multe pluvis, kaj mi daŭre ĝuas la esperantan etoson kun geamikoj en la tuta mondo, kiujn tiutempe mi konis perpoŝte, ĉar nek interreto nek personaj komputiloj ekzistis, sed tio ne estis obstaklo por renkontiĝi, kongresi, teatri eĉ filmi, ĉar mi kuraĝis partopreni kiel ĉefrolulo en esperanta filmeto, titolita «Stranga nupto», kiun multaj el vi iam spektis okaze de kongresoj kaj ĝi estas elŝutebla senpage kiel ankaŭ estas senpage ekŝutebla mia unua poemaro Mediteraneaj eroj.

Pli malpli skize klarigite, vi jam konas min kaj mi esperas havi novajn okazojn por paroli pri multaj spertoj.




**KIE NI TROVIĜAS? LA LABORA UNIVERSITATO, CHESTE KAJ ESPERANTO**

Ni kongresas ĉijare en tre speciala loko. Speciala pro du kialoj. Unue, ĉar la sidejo estas monumenta, eĉ grandioza; temas pri tre specifa aro da konstruaĵoj, iam konata kiel la "Labora Universitato", nun kiel la "Eduka Komplekso" de Cheste. Mi klarigos kiel naskiĝis kaj funkciis tiu institucio, profitante la okazon ke mi mem studis en ĝi dum mia infanaĝo. La dua kialo estas ke la urbo Cheste povas aspekti modesta, sed ĝi estis tre grava historie rilate al Esperanto; dum diversaj periodoj estis granda proporcio de esperantistoj kompare al la loĝantaro, kaj eĉ nun gastigas aktivan grupon "Lumradio". La okazigo de la kongreso estas bona momento por memorigi ambaŭ historiojn.

**José Antonio del Barrio**
**Direktoro de Fondaĵo Esperanto**

José Antonio (aŭ Toño) del Barrio, naskiĝis en 1961 en Norda Kastilio kaj interalie studis en la "Labora Universitato" de Cheste. Eklernis Esperanton en 1979 en Valadolido. Profesie fizikisto. Inter 2011 kaj 2020, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.



Ĝoje mi salutas la altkvalitan AMO-seminarion en la Universidad Laboral de Cheste, kun la partopreno de Duncan Charters, la prezidanto de UEA kaj la multjara surloka aktivulo Dennis Keefe kaj aliaj. Mi notas la saĝan elekton de subtenoj:

· Evoluoj en la instruado kaj lernado de lingvoj

· Kion ni povas lerni de poliglotoj pri lingvo-lernado

· Novaj perspektivoj pri la instruado de la Eo-gramatiko.

Mi deziras grandan sukceson en vuaj diskutoj!

**Stefan MacGill**
**Respondecoj en UEA: Landa Agado, AMO, EKO, Canuto**
**Respondecoj en ILEI: Loka kaj landa agado, Juna amiko**

# PRELEGANTOJ de HEK 2024



**José Antonio del Barrio**

***Festparolado: "Kie ni troviĝas? La Labora Universitato, Ĉeste kaj Esperanto"*** Fizikisto. Prezidanto de HEF 2011-2020. Direktoro de la Fondaĵo Esperanto. Ofte intervjuata ĉe nacia televido kaj radio pri Esperanto.



**Stefan MacGill**

Kvankam li ne prelegos, Stefan estas la patro de la AMO-Seminarioj – fundamenta parto de la prelegaro de la kongreso. La ĉefa temo ĉi foje centriĝos pri instruado kaj lernado de Esperanto, kaj prelegos pluraj nuntempaj lingvo-instruistoj de diversaj universitatoj kaj altlernejoj.



**Duncan Charters**

***Pluraj prelegoj.*** La prezidanto de la Universala EsperantoAsocio, Li estos nia ĉefa preleganto, kiu ankaŭ gvidos, partoprenos AMO-Seminarion, kiu rilatas la instruadon de Esperanto kaj Poliglotismo, interalie.



**Dennis Keefe**

***Prelegoj por la AMO-Seminario: pri edukado kaj instruado.*** Kreinto de Lingvaj Festivaloj, Iniciatinto de pluraj edukoprogramoj, lingvaj kaj komercaj, ene kaj ekstere de Esperantujo, kiel ĉe Esperanto-Insulo en Ĉinio, ĉe HEC Parizo. Komitatano B kaj C de UEA. Li kunlaboros kun Duncan Charters por la starigo de la HEK AMO-Seminario.



**Ruben Fernández**


***Amatoreco kaj profesieco en Esperantujo: kelkaj ĝeneralaj kaj priinstruaj spertoj kaj konsideroj.*** Nia profesoro de la E-Kursoj de la Universidad a Distance, UNED, la plej granda universitato en Hispanio. Bibliotekisto, arkivisto, instruisto. lingvo-profesoro.



**Ana Manero**

***Normaj numeroj kaj aliaj identigiloj de eldonaĵoj.***

Bibliotekisto ĝis sia emeritiĝo, Ana laboris en la Nacia Biblioteko de Hispanio kaj daŭre prizorgas la Bibliotekon Juan Regulo Pérez de HEF. Gajnintoj de pluraj premioj rilate elstaran laboron en Esperantujo.



**Amri Wandel**

***Astrofiziko por laikoj.***

Profesoro pri astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo. li esploras astrobiologion kaj nigrajn truojn. Prezidanto de la Israela societo por Astrobiologio kaj membro de la Internacia Astronomia Unio. Kreis kurson pri astrofiziko kaj instruadis ĝin dum 25 jaroj al ĉ. 4000 studentoj. Verkis lernolibrojn pri astrofiziko en la hebrea (2021) kaj la angla (2024).



**Gabriela Manzano**

***Malrespektemo al infanoj.***

La plej juna, esperanta preleganto en Eŭropo, Gabriela ankaŭ estas la aranĝanto kaj ĉefrolulo de Pika Pika Esperanto (Youtube, Tubaro). Helpinstruistino de Esperanto en Sevilo, Hispanio. 9-jarulino, kiu esperantistiĝis antaŭ 6 jaroj. Akademianen?



**Viko Manzano**

***Kial vi sukcesigas la neverajn novaĵojn. Konsekvencoj de la biologia evoluo.***

Profesoro pri psikologio. Universitato de Sevilo. Direktoro de Civiencia. Kunordiganto de internaciaj seminarioj kaj projektoj kiuj ankaŭ rilatas Esperanton.



**Antoni Badia kaj Pedro M. Martín**
***Ateliero pri Simplaj Magiaj Ludoj.***
Antoni Badia: emerita instruisto, senlaca partoprenanto de kaj e-renkontiĝoj kaj de longe amatora praktikanto de magiaj trukoj. Pedro M. Martín: emerita instruisto pri fremdaj lingvoj, aŭtoro i.a. de “Guia de conversa català-esperanto”, kunlaboranto de “Kataluna Esperantisto” kaj ŝatanto de magiaj ludo.



**Iván Garcia kaj Toni Espinosa**
***Bitarkivo.org: 9696 numeroj de historiaj revuoj, kaj vidu la libro-skanilon.***
Informadikisto. Nelacigebla skananto kaj skanisto de la projekto Bitarkivo.org. Miloj da gazetoj, oble pli da paĝoj, kun projekto kiu antaŭvideblas kolekti kaj protekti por ĉiam la pli ol jarcento de Esperantaĵoj: legeblaj, aŭdeblaj, spekteblaj...



**Niko Vološin**
***Karikaturoj en Esperanto-periodaĵoj kaj libroj.***
Talenta artisto el Ukrainio. Redaktoro de esperantaj gazetoj kaj revuoj. Eldonisto de esperanto-libroj. Niko prezentos siajn karikaturojn, kaj montras al ni kiel ili rilatas la mondon de Esperanto.



**Santiago Cerveró i Caballero**
Nova, talenta, lernanto de Esperanto de Cullera. Konanto de la kamparoj de Cullera, kun la oranĝujoj kaj rizo-kampoj. Pasiulo pri filmoj, en kiuj li kolektas ofte nekonatajn erojn de la Verda Lingvo.



**Euheno Kovtonjuk**

***Eroŝenko – ukraina blinda esperantisto-verkisto. Ukrainio: aktuala situacio, spertoj kaj pensoj.***

Diplomiĝis en Odesa Akademio de Manĝaĵ-Teknologioj (Ukrainio) kaj Kanzasa Universitato pri Greno-Komerco (Usono). Kunfondinto (1989) kaj la unua prezidanto de la Ukrainia Esperanto-Asocio, A-komitatano de UEA. Kunaŭtoro de la Granda Esperanta-Ukraina vortaro, membro de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio en Esperanto. Prezidanto de la Bonfara fondaĵo "Espero" nome de V. Eroŝenko. Partoprenanto de la pli ol 25 UKoj. Honora profesoro de la Industria Akademio de Ukrainio, honora profesoro de la Svisa Akademio de Lingvoj kaj Juro.





**Ana Montesinos**

***Kiom multe ni konas pri Esperanto en Hispanio?***

Diplomita pri Moderna Filologio, de Valencia Universitato. Aktiva Esperantisto ekde 1980, nun loĝanta inter Valencio kaj Londono. Instuisto laŭ la rekta metodo. LKK-ano en la Universala kaj ILEI Kongresoj de 1993 en Valencio. Komisiito de ILEI por la kongresoj en Kubo kaj en Urugvajo.


Multe kunhelpis kaj kontribuis al Internaciaj Esperanto-aranĝoj, en la 5 kontinentoj, ĉu en la organizado, ĉu per "Ludoj por plifortigi konon de Esperanto-lingvo kaj kulturo, kaj/aŭ por pligrandigi konon pri aliaj kulturoj".




**Laura Brazzabeni**


***La evolulo de la kurso 30 Oraj Horoj.***

Doktoriĝinte pri fremdaj lingvoj, Laura rajtas instrui kvar lingvojn: la angla, la germanan, la hispanan kaj Esperanton. Laura estas la prezidanto de la Itala Esperanta Federacio, kaj aktivas en ILEI.




**Alfred Ramón**

***Omaĝo al Don Félix Navarro, grava, historia esperantisto de Valencio*** (ES/EO).




**José Vicente Castillo,**
**María J. Adelantado**
***“Los Trenes de Esperanto”***
***kaj “Sonata Telúrica” – Dos Libros “verdes”.***

José Vicente y María: Dos autores en cuyos libros el Esperanto juega un papel diferente. El primero en un mundo de hace un siglo; en el segundo, en un universo utópico a venir...




**Arno Lagrange**
***Stefan Zweig: Eŭropa verkisto.***

Aktiva vikipedisto ekde la jaro 2002, denaska Esperantisto, Esperanto-aktoro (TESPA en Parizo, Krizalido), en 2017 diplomiĝis pri lingvistiko ĉe la Universitato de Tuluzo en Francio.



**Ismael Ejarque**
***Kiam la kancero estas heredita,***
***kion oni devas scii?***

Doctor pri medicino kaj kirurgio, Universitato de Valencio (Cum Laude). Diplomita pri genetiko, Universitato de Genova, Italio. Kuracisto de familio. Esploristo. Dekoj da sciencaj prelegoj ekster Esperantujo.



# GRAVAJ LOKAJ ESPERANTISTOJ

Tri ejoj por prelegoj estas nomitaj favore al tri gravaj valenciaj esperantistoj, kiuj estis veraj motoroj de loka movado, kaj ne nur loka, en diversaj periodoj.



**Augusto CASQUERO DE LA CRUZ** (naskiĝis en Plasencia (provinco de Cáceres) Hispanio, 31-a de januaro 1945, mortis en Valencio, 19-a de septembro 2023) estis hispana esperantisto.

Li estis oficiro de la hispana Armeo, diplomita profesoro pri Ĝenerala Baza Edukado, kaj licenciulo pri Edukado, en la branĉo de Speciala Edukado en la Komplutensa Universitato de Madrido (1985). De 1987 li laboris kiel logopedo.

Kiam li esperantistiĝis (1969), li instruis la lingvon en Madrido kaj Valencio, sed ankaŭ en aliaj landoj, kiel Slovakio, Pollando, Usono kaj Ĉinio. Li instruis Esperanton dum ses jaroj en la Fakultato pri Filologio de Valencio.

Augusto okupis diversajn postenojn en Esperantistaj asocioj, inter kiuj li estis Prezidanto de Madrida E-Liceo, Prezidanto de Valencia E-Federacio, prezidanto de la LKK de la UKo en Valencio (1993) kaj de pluraj hispanaj kongresoj. Li estis Prezidanto de Hispana E-Federacio, inter 2005 kaj 2008.

Li ricevis du literaturajn premiojn en Esperanto (mallongaj rakontoj) kaj unu en valencia lingvo (eseo). Li verkis dudekon da eseoj pri Esperanto, pedagogio kaj logopedio, kaj centojn da artikoloj en Esperanto. Li estis verkanto por la revuo Monato.



Augusto ricevis la Internacian Premion Ada Fighiera-Sikorska, en 2004, pro sia agado en la esperanto-movado.

**José PÉREZ Sempere** estis valencia esperantisto, kiu mortis en 2022 kaj kiu estis la prezidanto de la Valencia Esperanto-Grupo ĝis decembro 2019.

(foto de 1961).



**Félix NAVARRO** estis valencia esperantisto, konata dank al siaj radioprogramoj ”Esperanto en la Radio con Don Félix Navarro”.

*Por ekscii pli da pri tiu aktivulo vizitu prelegon “Omaĝo al Don Félix Navarro, grava, historia esperantisto de Valencio” de Alfred Ramón la 7an de septembro je la 13.00.*

# PROGRAMO de PRELEGOJ

| Dato | Horo | Ejo | Nomo | Titolo |
|---|---|---|---|---|
| 6 sep | 12 | C | José Antonio del Barrio | Festparolado: «Kie ni troviĝas? La Labora Universitato, Cheste kaj Esperanto. |
| 6 sep | 13 | C | Laura Brazzabeni | La evolulo de la kurso 30 Oraj Horoj. |
| 6 sep | 13 | N | Arno Lagrange | Stefan Zweig: eŭropa verkisto |
| 6 sep | 13 | S | Dennis Keefe | La Post-Kongreso: Ni venas, ni vidas, ni Valencias... |
| 6 sep | 16 | C | Duncan Charters | Evoluoj de la Instruado kaj Lernado de Esperanto |
| 6 sep | 16 | N | Euheno Kovtonjuk | UkrainIo: aktuala situacio, spertoj kaj pensoj |
| 6 sep | 16 | S | Dennis Keefe | Esperanto-Insulo, Esperanto-Plaĝo: Ĉinio kaj Hispanio. |
| 6 sep | 17 | C | Amri Wandel | Astrofiziko por laikoj (unua parto). |
| 6 sep | 17 | N | Ismael Ejarque | Kiam la kancero estas heredita, kion oni devas scii? |
| 6 sep | 17 | S | Jose Vicente Castillo, | Libro: Sonata Telúrica |
| | | | María Adelantado | Libro: Los Trenes de la Esperanza. |
| 6 sep | 18 | C | Niko Volosîn | Karikaturoj en Esperanto-periodaĵoj kaj libroj. |
| 6 sep | 18 | N | Raia Androvska | La Verdaj Drakoj de 2024. |
| 6 sep | 18 | S | Ana Montesinos | Kiom multe ni konas pri Esperanto en Hispanio? |
| 7 sep | 10 | C | Duncan Charters | Kion ni povas lerni de poliglotoj pri la lernado de Esperanto? |
| 7 sep | 10 | N | Euheno Kovtonjuk | Eroŝenko: ukraina blinda esperantisto-verkisto. |
| 7 sep | 10 | S | Antoni Badia, Pedro M. | Ateliero pri Simplaj Magiaj Ludoj. |
| 7 sep | 11 | C | Ana Manero | Normaj numeroj kaj aliaj identigiloj de eldonaĵoj. |

| Dato | Horo | Ejo | Nomo | Titolo |
|---|---|---|---|---|
| 7 sep | 11 | N | Rubén Fernández | Amatoreco kaj profesieco en Esperantujo: kelkaj ĝeneralaj kaj priinstruaj spertoj kaj konsideroj |
| 7 sep | 11 | S | Antoni Badia, Pedro M. | Ateliero pri Simplaj Magiaj Ludoj |
| 7 sep | 12 | C | Iván Garcia, Toni Espinosa | Bitarkivo.org: 9696 numeroj de historiaj revuoj, kaj vidu la libro-skanilon |
| 7 sep | 12 | N | Amri Wandel | Astrofiziko por laikoj (dua parto). |
| 7 sep | 12 | S | Duncan Charters | IKK, Interkultura Kompetento rilate al Esperanto. |
| 7 sep | 13 | C | Alfred Ramón | Omaĝo al Don Félix Navarro, grava, historia esperantisto de Valencio (ES/EO) |
| 7 sep | 13 | N | Duncan Charters | Novaj Perspektivoj pri la instruado de E-o gramatiko. |
| 7 sep | 13 | S | Antonio del Barrio | Libro: "Volontuloj kun okulvitroj". La rolo de intelektuloj kaj de esperantistoj en la Hispana Enlanda Milito. |
| 7 sep | 16 | C | Viko Manzano | Kial vi sukcesigas la neverajn novaĵojn. Konsekvencoj de la biologia evoluo. |
| 7 sep | 16 | N | Duncan Charters | La strategio laborplano de UEA. |
| 7 sep | 16 | S | Dennis Keefe | La Praktika Bildvortaro de Esperanto: Lecionoj retaj, lecionaj ĉeestaj. |
| 7 sep | 17 | C | Gabriela Manzano | Malrespektemo al infanoj. |
| 7 sep | 17 | N | Santiago Cerveró | La uzo de Esperanto en filmoj: antikvaj kaj modernoj. |
| 7 sep | 17 | S | Olga Skobeeva Bauer | Mediaj falsaĵoj, kiel rekoni kaj rezisti falsajn informojn. |
| 7 sep | 18 | C | FINO: Ĉiuj prelegantoj kaj atelieranoj. Ĉiuj temoj de la Kongreso. | |

Ejo N – Parolado-Spaco Navarro (Don Felix Navarro).
Ejo S – Parolado-Spaco Sempere (Sinjoro Sempere).
Ejo C – Salonego Casquero (Aŭgusto Casquero).


# La PARTOPRENANTOJ de HEK 2024

| | |
|---|---|
| Alberto Granados Orcero | Teruel Hispanio |
| Luis Salag Laguarda | Valencia Hispanio |
| Raia Androvska | Sofia Bulgario |
| Dennis Keefe | Cullera Hispanio |
| Ramón Diago Marco | Bugarra Hispanio |
| Manolo Parra Benito | Madrid Hispanio |
| Ana Manero García | Madrid Hispanio |
| Santiago Camblor | San Martín de Valdeiglesias Hispanio |
| Homeira Momeni | San Martín de Valdeiglesias Hispanio |
| Lola Pérez | Alicante Hispanio |
| Lija Mazij | Alicante Hispanio |
| Toño del Barrio | Alkorkono Hispanio |
| Laura Brazzabeni | Mantova Italio |
| Xavier Detournay | Limoux Francio |
| Carlos Spinola | Malago Hispanio |
| Jesus Miguel Garcia Iturrioz | Portugalete Hispanio |
| Dalia Pileckiene | Kaunas Litovio |
| Javier Martín Gómez | Teruel Hispanio |
| Francisco Julián Herrer Armijo | Teruel Hispanio |
| Miguelángel Bueno Ávila | Puente Villarente Hispanio |
| Olga Bauer Skobieieva | Ĉernivci Ukrainio |
| Pako Lopez | Bilbao Hispanio |
| Ĵotaro Takada | Tokio Japanio |
| Mónica Cruz Martín | Alcalà de Xivert Hispanio |
| Irene Albert Cruz | Alcalà de Xivert Hispanio |
| Eŭheno Kovtonjuk | Kiyivo Ukrainio |
| Adoración («Dori») Gromaz Armenteros | Barcelono Katalunio |
| Jordi Perera Faura | Moià Katalunio |
| Lupe Sanz Bueno | Madrido Hispanio |
| Carmen Suárez Fernández-Cid | Madrido Hispanio |
| Pablo Mendoza Casp | Valencia Hispanio |
| Ángel Arquillos López | Malago Hispanio |
| Maria Dolores Torres Mateos | Malago Hispanio |
| Pedro A. Hernández Úbeda | Madrid Hispanio |
| Ricardo Biurrun González | Madrid Hispanio |
| Angel Garcia Gutierrez | Santander Hispanio |

| | |
|---|---|
| Irina Grigorieva | Santander Hispanio |
| Ivan Garcia | Banyeres de Mariola Hispanio |
| Marc Cuffez | Oostende Belgio |
| Janez Zadravec | Maribor Slovenio |
| Belén López | Zaragoza Hispanio |
| Sylvie Roques | Toulouse Francio |
| José Salguero | Don Benito Hispanio |
| Carmen Cidoncha | Don Benito Hispanio |
| Juan Luis Salguero | Badajoz Hispanio |
| Boguslaw (Esu Peranto) Ubik-Perski | Weil am Rhein Germanio |
| Santiago López Ferreira | Zaragoza Hispanio |
| Javier Romero Tello | Herrera del Duque Hispanio |
| Alberto Corral Martín | Santander Hispanio |
| Rosa del Mar Santiago Mancebo | Santander Hispanio |
| Ana Maria Ferrer | Maribor Slovenio |
| Katarzyna Ubik-Perska | Weil am Rhein Germanio |
| Avelinda Ruiz Cervel | Zaragoza Hispanio |
| Ángel Blanco Sancho | Zaragoza Hispanio |
| Enrique Navarro Rubio | Zaragoza Hispanio |
| Pako Balibrea | León Hispanio |
| Antoni Badia i Planes | Lleida Hispanio |
| Paulo Meliz Irache | Monzon Hispanio |
| Joan Clos Rigual | Vilafranca del Penedés Hispanio |
| Jaime Vinielles de Pereda | Ĉinĉón Hispanio |
| Encarna Teruel | Berlino Germanio |
| Guillermo Bes Salazar | Santiago de Cuba Cuba |
| Amri Wandel | Modiin Israelo |
| Itziar Arteche Urrutia | Bilbao Hispanio |
| Ignacio Cancelo de Juan | León Hispanio |
| Gianantonio Pfleger | Riva del garda Italio |
| Rodica Todor | Brasov Rumanio |
| Luz Vázquez Souto | Reus Hispanio |
| José Miguel Bernabéu Egea | Mutxamel Hispanio |
| Rubèn Fernández Asensio | Badalona Katalunujo |
| Zdravko Seleš | Đurđevac Ĥorvatio |
| Josip Pleadin | Đurđevac Ĥorvatio |
| María Luisa De Lamo Blazquez | Munera (Albacete) Hispanio |
| Albert Stalin Garrido | Madrid Hispanio |

| | |
|---|---|
| Pedro Martínez Talaván | Madrid Hispanio |
| Elsa Martinez Castro | Madrid Hispanio |
| Paula Martínez Martínez | Madrid Hispanio |
| Alessandro Amerio | Torino Italio |
| Jorge Mal | Almerio Hispanio |
| Paul Quévy-Lefevre | Les Petites Coges Francio |
| Nicole Quevy-Lefevre | Les Petites Coges Francio |
| Pilar (Bikeiterra) | |
| Busquets Bosch | Lleida Hispanio |
| Jau Juan Sendra | Valencio Hispanio |
| Ann-Louise Åkerlund | Helsingborg Svedio |
| Mateusz Pietraszek | Madrid Hispanio |
| Peter Bankholm | Helsingborg Svedio |
| Anton Oberndorfer | Gunskirchen Aŭstrio |
| Conor Foley | Cork Irlando |
| Toni Espinosa Largo | Reus Hispanio |
| Antonio Justicia Guzman | Huelma Hispanio |
| Felix Sanchez Boquete | Santiago de Compostela Hispanio |
| Paulo Branco | Lisboa Portugalio |
| Ludoviko de Gibert | Vilafranca del Penedès Hispanio |
| Carmen Lopez | Valencia Hispanio |
| Renaud Balleyguier | Clermont-Ferrand Francio |
| Caroline Lottenbach | Torredembarra Hispanio |
| Rosalina Zanón Ferrando | Cheste Hispanio |
| Duncan Charters | Elsah Usono |
| José (Pepe) Manzanera Sapena | Cheste Hispanio |
| Arno Lagrange | Tuluzo Okcitanio |
| Niko Vološin | Lutsk Ukrainio |
| André Grossmann | Baldersheim Francio |
| Sanoza Rao | Baldersheim Francio |
| Ana Montesinos | Londono Britio |
| Yuping Wang | Shanghai Ĉinio |
| Maria del Carmen | |
| Ssegarra Llopis | Saint Raphaël Francio |
| Pablo Jorge Pinazo | Teruel Hispanio |

# LA LABORA UNIVERSITATO



# POST-KONGRESO:
## la 9-23 de septembro, Valencio kaj ĉirkaŭaĵoj.

Tuj post la Landa Kongreso, vi povos partopreni en abundaj vizitoj kaj ekskursoj, kaj tio, laŭ via plaĉo, inter unu tago ĝis 14 tagoj.

Kie loĝi dum la Post-Kongreso? Pro la fakto, ke ĈIUJ ekskursoj komenciĝas je la 10a matene, ĉiam en la sama loko, sub la granda, ekstera horloĝo de la stacidomo Valencia Nord, vi povas loĝi ne nur ie ajn en Valencio mem, sed ankaŭ en ajna urbeto, kiu troviĝas sur la trajno-vojoj kiuj iras al Valencia Nord.

Niaj vizitoj estos vastaj, sed memoru, ke la celo estas ne nur vidi interesajn historiajn kaj kulturajn partojn de Valencia Urbo kaj Valencia Regiono, sed ankaŭ ekkoni novajn Esperantistojn. Babili esperante. Ĝui la lingvon, eĉ montri ĝin vaste kaj ĝoje.



### Kalendaro: Unua semajno, 9 sep - 15 sep.

**Lunde, la 9an de septembro:** vizitante la historian centron de Valencio, tagmanĝante kiel la Valencianoj (unua plado, dua plado, deserto, trinkaĵo, (10 - 13 eŭroj), finante nian tagon ripoze ĉe la Botanika Ĝardeno.

Ĉiĉeronoj: Dennis Keefe, Raia Androvska.

**Marde, la 10an de septembro.** La plej longa parko en Eŭropo, la mirinda Parko Turia. Ĝi longas je pli ol ok kilometroj. Tagmanĝo ĉe la UK Kongreso de 1993! Ni vizitos la faman Urbo de la Artoj de la Sciencoj.

Ĉiĉerono: Luis Salag.

**Merkrede, la 11an de septembro.** Ni trajnos al la urbo Castellón, invitite de Francisko Conejero, por komuna, vegetara, tradicia valencia tagmanĝo ĉe lia farmbieneto. La centro de la urbo Castellón.

Ĉiĉerono Francisco Conejero.

**Ĵaŭde, la 12an de septembro**. La plej granda marbesto-ĝardeno en Eŭropo, la Oceanografiko, post tio la Urbon de la Artoj kaj Sciencoj. Kaj post la tagmanĝo - la muzeo de Las Fallas de Valencio.

Ĉiĉeronoj: Raia Androvska.

**Vendrede, la 13an de septembro.** La scienca muzeo Principe Felipe II

kun astronomo kaj astrofizikistso d-ro Amri Wandel. Post tagmanĝo ĉiuj povas spekit specialan scienco-rilatan filmon en la spektakulara 3-dimensia kinejo de Valencio, la Hemisferic. Kaj, post la filmo, vi povas ĝuis la kafejon de la Hemisferic.    Ĉiĉerono: d-ro Amri Wandel.

**Sabate, la 14an de septembro.** La feria urbo de la region Cullera: la rivero, la hejmo de la fiŝkaptistoj, la kastelo kaj preĝejon sur la monto, la ĉarma trinkejo de kie vi vidos la tutan Mediteraneon.  Vi ankau tagmanĝos en Cullera.

Ĉiĉerono: Santiago Cerveró i Caballero, loka esperantisto.

**Dimanĉe, la 15an de septembro.** Busekskurso al plej granda lago kaj naturparko de Hispanio, la Albufera, vilaĝo El Palmar, hejmo de la fama hispana rizaĵo paella, loko kie portempe loĝis la fama valencia verkisto Blasco Ibañez.  Post tagmanĝo vi povos boatumi sur la lago, gvidata de loka fiŝkaptisto aŭ rizo-kamparano.

Ĉiĉerono: Dennis Keefe.

## Dua semajno, 16 sep - 22 sep.

**Lunde, la 16an de septembro.**  La bluflagaj plaĝoj de Cullera, la rivero Jucar, la digo, markita de lumtureto, la pirata kaverno Dragut, la lumturo El Faro, Esperanto-Plaĝo (fama Esperanto-Kursejo). Tagmanĝo estos en malmultekosta tradicia valencia restoracio (10-11€).

Ĉiĉerono, Dennis Keefe.

**Marde, la 17an de septembro.** La Etno-Muzeo de Valencio, la Muzeo de la Prahistorio. Kaj survoje al la dua plej granda arto-muzeo en Hispanio, La Muzeo de Belartoj de Valencio, la moderna arto-muzeo IVAM, la Parko Viveros, tagmanĝo ĉe la Universitato de Valencio.

Ĉiĉerono: La Valenciano-teamo.

**Merkrede, la 18an de septembro.** La grandega plaĝo de Valencio, la Malvarrosa. La urbo-vilaĝo Cabañal. La Marhaveno.

**Jaŭde, la 19an de septembro.** El Tribunal de las Aguas (Mondheredaĵo de UNESKO). El Kadedralo de Valencio. La pokalo de Kristo. La muzeo de arkeologio. La antikva universitato de Valencio. Torres de Serranos. Barrio del Carmen.

**Vendrede, la 20an de septembro.** Benimaclet, Alboraja, La vojo de la "horchata", Saplaya, la Venecio de Hispanio.

**Sabate, la 21an de septembro.** Manises, la urbo de la Ceramiko. Aldaia, la fabriko de hispanaj mano- ventumiloj:  Ĉiĉerono: Carmen Lopez.

**Dimanĉe, la 22an de septembro.** Du urboj de la mezepoko, renesanco: Alcira kaj Xátiva.  Ĉiĉeronoj: Pau Mendoza Casp kaj la Valencianoj.


**Grupo Esperanto Lum-Radio Cheste**
rosazafe@gmail.com

**Grupo Esperanto Valencia**
valencia@esperanto.es
Avinguda de Peris i Valero nº 96 pta 5,
Quatre Carreres, 46006, València
+34 623 02 40 45










Vizitu la straton nome de L. Zamenhof en Valencio.




## LA SPACO POR VIAJ NOTOJ


© Redaktis kaj maketis Niko Volôsin



Cheste



Cullera



Alboraya



Peñíscola



Valencia

Ayuntamiento de Cheste

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO